



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 172, Decembro 2024**



JEGA 第43回新春囲碁大会のお知らせ

恒例の新春囲碁大会を下のように開きます。奮って参加してください。

日時： 2025 年1月13日(成人の日) 10:30~16:00

場所： 大崎囲碁クラブ (電話 03-3491-1349)

(JR 大崎駅下車、北改札口を出て西口へ。向かい側藤和大崎コープ4階405号室)

会費： 2000円(当日お弁当を用意します) *年会費、寄付金も受け付けます。

出欠の連絡： メール、ファックス、電話で、堀までご返事ください。

堀泰雄 371-0825 前橋市大利根町 2-13-3

メール：horizonto@r.water.sannet.ne.jp 電話・ファックス:027-253-2524

La 43a Novjara Go-konkurso de JEGA

Ni okazigos la 43an Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 13an de januaro 2025 ekde la 10 :30 ĝis la 16a

Loko : Go-klubo de Oosaki (tel : 03-3491-1349)

en la ĉambro 405 en la 4a etaĝo de la apartamentaro de
Toowa-Oosaki tuj antaŭ la okcidenta elirejo de la
JR-stacidomo Oosaki en Tokio

Kotizo : 2000 enoj inkluzive de lunĉo

Se vi volas partopreni, kontaktu Hori (horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

日韓共同大会で囲碁分科会

Go-kunsido dum la Komuna Kongreso inter Koreio kaj Japanio

La 5an kaj la 6an de oktobro 2024 okazis Komuna Kongreso inter Koreio kaj Japanio en Koreio. En ĝi ni povis bonorde okazigi kaj prizorgi la fakan kunsidon de Go-ludo. Ludintoj 4 kaj lernintoj 2, kaj rigardintoj kelkaj, do entute ĉirkaŭ dek partoprenis.



1. La kvar ludintoj de go-ludo estis koreaj inkluzive min. Du lernintoj, la infano kun la patrino estis ĉinaj. Ĉirkaŭ kvar rigardintoj kaj/aŭ babilintoj estis ĉinaj. Unu japana s-ino OKADA Fumiko, kiu restis tie nur en la

komenco de la kunsido kaj foriris, ne troviĝas en la fotoj.


2. La infano kaj la patrino verŝajne estis parencoj de ĉina esperantisto, kaj ne parolis en Esperanto. La patrino parolis ankaŭ angle. Mi kaj korea juna esperantisto nomata YANG Hee-jin, bone parolanta esperante kaj bone ludanta goon, instruis goon al ili anglalingve.

3. Mi ludas goon rete nur en korea retejo Hangame (한게임), sed malofte. Tie mi estas sep-dana, sed al mi la nivelo ses-dana plaĉas. Ludon kun sep-danulo mi iom timas.

Raportis HO Song (Koreio)



Go-ekzercaro por Komencantoj (35)



Profesiulo: Kontraŭ B1, kial Nigro sin-gardis per N2?

Komencanto: Mi sentis ian danĝeron.

Ĉu malbone estis la singardon?

P.: Ne necese estis tiel singardi.

K.: Kiel mi devus respondi?

P.: Ekzemple Nigro povis bati blankon per N3, singardi samtempe lim-aranĝante.

K.: Mi komprenas!

P.: Vi progresis, ke vi povas trovi tranĉeblan punkton. Tamen vi devus rimarki, ĉu restas spirpunkton aŭ ne.


Se Blanko plue ŝtonmetas B-a, ĉi tiam necesas singardo B2.

K.: Grava estas nombro de spirpunktoj. Mi rememoras.

(Adaptita artikolo citita el “Kreskada noto de AMIGO” en japana ĵurnalo “Semajna GOo”)


La problemo 293-a

Nigro havas meton.



La problemo 294-a

Nigro havas meton.



La solvo 293-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. Unuavide ne-esenca N1 estas bona. Kontraŭ absoluta B2, Nigro enpuŝas per N3, kaj Blanko havas nenium kontraŭrimedon. Anstataŭ N3, se N-a, Blanko reviviĝus per B-b.

Fig. 2-a: Malsukceso. Unuavide esenca estus N1. Tamen Blanko povas sinviviĝi. Se Nigro unue metas Nn2, Blanko respondos per B1.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

La solvo 292-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. Unue sufokigi Blankon per N1. Kontraŭ B2, Nigro metas Nn3 kaj Blanko ne povas eniri en 'a', kaj fariĝas 'interna kvar'. Anstataŭ B2, se B-a, Nigro suben-iros kiel N-b. Blanko ne povas bari per B2 pro la sufokeco.

Fig. 2-a: Malsukceso. Kontraŭ N1, ĉi tiam Blanko povas bari per B2. Se Nigro unue metas Nn2, Blanko lavange-kaptos kiel B1, N-c, B-d.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

(cititaj el ĵurnalo "ASAHI SINBUN")

Kiel mi iĝis goo-entuziasmulo (1)

Christoph Klawe (Germanio)



Iom strange kaj ne eksplikeble ekde mia infanaĝo mi sentis grandan emon al la estetiko de japana arto kaj japana kulturo. Kiam mi estis 14-jaraĝa junulo, mi ĉiam havis libron kun eldiroj de Budho en mia poŝo. Miaj gepatroj kompreneble notis mian inklinon kaj je la vintro de la jaro 1980 vidis en ia ĵurnalo anoncon pri bela ludtabulo de japana ludo. Ili decidis doni al mi tiun ludon - evidente estis goo - kiel kristnaskodonacon. Mi vere ĝojis kaj la tabulo kaj la ŝtonoj sendube estis belegaj. Miaj tre afablaj gepatroj ankaŭ

estis pretaj ludi kun mi, sed ni ĉiuj, verdire, havis problemojn kompreni la regulojn, ĉar la priskribo de ili en eta aldonita kajereto por ni ne estis sufiĉe klara.

Do post kelkaj provoj ludi mi decidis serĉi vojon lerni pli pri la korektaj reguloj kaj pri kiel bone ludi goon. Vere en librovendejo mi trovis libron pri goo kun la titolo „La japana ludo goo“ de iu Winfried Doerholt kaj aĉetis ĝin (germana libro). Mia patro en sia taglibro mencias la tagon mem, kiam mi akiris la verkon: estis iam en printempo de la jaro 1981. El mia hodiaŭa vidpunkto, la libro estas nevole amuza: sur la kovrilo troviĝas foto de plenigita ludtabulo, sed la pozicio montrita apenaŭ havas sencon; se la ŝtonoj ne estis hazarde disigitaj sur la tabulo de librokovrildesegnisto, kiu ankaŭ ne scipovis ludi goon, devas temi pri rezulto de partio inter ne tro fortaj ludantoj. Kaj la fortonivelo de la aŭtoro tiam certe ankaŭ ne estis tro alta. Sed por mi

tiutempe la libro estis tre taŭga enkonduko. Post kiam mi estis trastudinta la libron, miaj gepatroj pli kaj pli perdis la emon ludi goon kun mi, ĉar la partioj iĝis iom unuflanka.

Evidentiĝis, ke „vera“ intruanto kaj ludanto kun pli grandaj spertoj ol tiuj de nura komencanto estis urĝe bezonata. Sed kiel trovi? Feliĉe fine de la libro troviĝis indiko pri persono, kiu pretis peri kontakton al ekzistantaj kluboj kaj ebligi abonon de la germana goo-revuo. Temis pri iu Karl-Ernst Paech, la tiama prezidanto de la germana goo-asocio. Fascina koincido: hodiaŭ mi scias, ke s-ro Paech estis fervora Esperantisto (!), kiu instruis la lingvon tuj post la dua mondmilito kaj krom esti pionira aganto por nia „verda“ lingvo en la germana federacia respubliko organizis multajn goo-turnirojn ekskluzive por Esperantistoj poste. Sed mi ja nur esperantiĝis multajn jardekojn post kiam mi estis trovinta la nomon de s-ro Paech en mia unua goo-libro. Do, tiame mi skribis leteron al s-ro Paech kaj demandis lin pri la goo-klubo plej proksime al mia hejmurbo, Majenco en Germanio (germane: Mainz). Kaj - NENIAM mi ricevis respondon.

Sed ŝajne la fato nepre volis vidi min en la cirkloj de seriozaj goo-ludantoj. Ian vesperon kune kun mia patro mi estis en la elevatoro de la domo, en kiu miaj gepatroj kaj mi loĝis. Kune kun ni uzis la elevatoron juna viro kun sia fiancino, kiun li ĵus estis vizitanta, kaj li diris al ŝi: „Nu, poste ĉi tiun vesperon mi ankoraŭ iros al la goo-klubo, se vi konsentas.“ Tiun dirinte, ili forlasis la elevatoron. Mi ne kredis miajn orelojn, kaj diris al mia patro: „Ĉu vi aŭdis, kiun mi aŭdis?“. Kaj mia patro jesis, kaj kuraĝigis min iri al la loĝejo de la familio de la juna virino, kiu gastigis la viron, kaj demandi. Kaj jes, nekredeble: la juna sinjoro, studento de fiziko, frekventis unu el la tiutempe en Germanio tre raraj goo-kluboj, kio kutime kuniĝis en najbara urbo, Visbadeno (germane: Wiesbaden). Li kompreneble ĝojis pri mia intereso kaj ofertis kunporti min al la klubo ankoraŭ la saman vesperon.

Tiu estas la komenco de mia serioza okupiĝo kun la goo-ludo. Ekde tiam, mi ĉion semajnon ludis en la visbadena klubo, kaj mi aŭ veturis

kun Manfredo, la studento, aŭ mia kara patro, nun jam forpasinta, veturigis min visbadenon kaj hejmen post la fino de la klubvesperoj. Mi partoprenis mian unuan turniron kun bona rezulto. Temis pri la „Magister Ludi Turniro“ („Magister Ludi“ estas latina por „majstro de la ludo“ - nomita laŭ protagonisto en la romano „La Ludo De La Vitraj Perloj“ de germana aŭtoro Hermann Hesse). Iam montriĝis, ke fakte la plejmulto de la ludantoj en la klubo venis el Majenco, do finfine feliĉe post kelkaj monatoj la klubo estis translokitita tien kaj por mi nun estis multe pli facile partopreni la klubvesperojn, ankaŭ sen helpo de miaj gepatroj. Nun mi havis aliron al internaciaj libroj pri la goo-ludo kaj kolekto de majstropartioj. Mi nun ofte ludis kun pli fortaj ludantoj kaj rapide pliboniĝis. Miaj gepatroj iam en tiu tempo donacis al mi novan anglan eldonon de kompleta kolekto de la partioj de fama japana majstro Shusaku kaj dum kelkaj jaroj mi trastudis la tutan libron.

Unu el la ludantoj de la klubo doktoriĝis en kemio je la majenca universitato, ne tro for de la loĝejo de miaj gepatroj. Ĉar li por sia disertacio devis fari longdaŭrajn eksperimentojn, kun multe da atendotempo inter komenco de la eksperimentoj kaj la akiro de la rezultoj, li invitis min al sia laborejo, kie ni ofte ludis sur tabulo kun ĉinastilaj ŝtonoj (plataj je la suba flankoj) kaj trinkis kafeon el iom dube purigitaj Erlenmeyer-flakonoj.

Dum la kompulsiva servo en la armeo mi kelkfoje nokte okupiĝis per trastudo de interesaj partioj kaj solvo de goo-problemoj. Mi renkontis interesajn homojn ludante goon kaj gajnis novajn amikojn. En la urbo, kie mi servis en la armeo, ne estis goo-klubo. Do mi kreis afiŝojn en diversaj, ankaŭ aziaj lingvoj por serĉi iun, kiu bone scipovas ludi. Kaj elpaŝis ĉina studento, kiu nek regis la germanan nek la anglan; kaj ĉar mi ne regis la ĉinan, ni ne havis kuman lingvon krom la goo-ludo. Sekve ni ludis, kune trinkis teon kaj senforte amikiĝis.

Dum miaj studoj en la universitato mi ludis en nia klubo, ofte partoprenis ankaŭ internaciajn turnirojn, ekzemple dum kelkaj jaroj

ĉiujare tiun en Parizo je la paska semajnfino, kaj amikiĝis kun goo-ludantaj studentoj el Ĉinio kaj Koreio.

Ĝis hodiaŭ mi daŭre ludis en la goo-kluboĵ de la urboĵ, en kiuj mi loĝis. Kompreneble la dispono de interretaj goo-serviloĵ estis giganta paŝo antaŭen. Kiam mi estis komencanta ludi goon, malfacilis trovi aliajn sufiĉe fortajn ludantojn kaj renkonti ilin por ludi. Post la alveno de la interreto, vi tage kaj nokte facile kaj tuj trovas iun por ludi. Do nun mi ankaŭ ludas pere de la diversaj internaciaj goo-serviloĵ.

Dum la goo-ludo en Germanio estis iom ekskluziva kaj elita, ekzotika ŝatokupo kiam mi komencis ludi en la 80-aj jaroĵ, goo en Germanio kompare al tiuj tempoj nun estas preskaŭ „amasa“ fenomeno: la germana goo-asocio havas pli ol 2000 membrojn. Dum la goo-ludantoĵ iom ĥaose renkontiĝis kiam mi komencis ludi goon, la germana goo-asocio hodiaŭ estas bonege organizita kaj zorgas pri entuziasmigo de junuloĵ por la goo-ludo, ofertas multon da helpo por novaj kluboĵ, organizas nacia teamo-ĉampionaton simile al tiu de la futbalistoĵ, bonege sukcesas kunigi la ludantojn kaj eldonas sufiĉe altkvalitan nacia goo-revuon.

Kion mi ege ŝatis pri la goo-ludo estis, ke temis laŭ mia pritakso pri la pinto de homa kulturo kaj la evolucio de la menso, pro sia komplekseco ne plene explorebla, postulante respekton preskaŭ kiel mistero.

Tiu mia sinteno, mi devas konfesi, estas iom skuita per la alveno de goo-ludanta AI, Alpha-goo, en la jaro 2016. Kiel ĉiuj goo-entuziasmuloĵ scias, Alpha-goo estis vera revolucio. Nun ne plu valoras la pritaksoĵ de profesiaj goo-ludantoĵ, kiuj komentis partiojn kaj inter si diskutas diversajn opiniojn pri interesaj metoĵ sen espero iam ekscii, kio estas la abstrakta vero malantaŭ tiuj disputoĵ, sed oni demandas la opinion de AI, kiu ne estas venkebla de homoĵ kaj tial estas la plej alta aŭtoritato.

Tamen por mi iel pruvo, ke eble pravas la teorio de la preskaŭ forgesita filozofa Pierre Teilhard de Chardin, ke la direkto de la evoluo kuras de la materia mondo al la nur plu spirita, nuntempe pli bone

realigita en komputilaj maŝinoj, kiuj eble iom havos la kapablon lasi la homon kiel ŝtupo de la evoluo malantaŭ si.

Interesa aspekto de la goo-ludo estas, ke vi estas devigita fari decidojn. William Pinckard tre bone eksplikas tiun en sia eseo „Goo kaj la tri ludoj“ (<https://www.kiseidopublishing.com/three.htm>). Ŝako respeguligas mondon, en kio la homo estas enplektita en socian sistemon, kio limigas sian liberecon, kaj ene de tio li devas fari la plej bonajn elektojn. Triptrako respeguligas mondon, en kio homo devas fari decidojn bazitaj sur la eblecoj, kiojn la hazardo ofertas. Sed en goo, la ludanto mem estas plene respondeca por ĉio, kion li decidas kaj faras, kaj ne havas la rajtojn ŝovi la respondecon por malsukcesoj al ia alia faktoro. Tio estas sendube tre forta skolo, daŭre eltenebla nur por eta elito.

Do certe restas, kion saĝaj profesiaj ludantoj jam ĉiam akcentis pri la goo-ludo: estas okupo de gesinjoroj por eduki la menson. Kaj mi daŭre ĝuas renkonti fascinajn homojn super la goo-tabulo kaj pasigi belajn horojn esplorante la vastan kosmon de la ludo.

私はどうやって囲碁好きになったか

クリストフ・クラヴェ (ドイツ)

どういいうわけか不思議なことに、そして説明できないのですが、子供の頃から私は日本美術や日本文化の美学に対して大きな好みを感じてきました。私が 14 歳のとき、私はいつもブツダの言葉を集めた本をポケットに入れていました。もちろん両親は私のこの性癖に注目しており、1980 年の冬、ある新聞に日本のゲームの美しいゲーム盤の広告を目にしました。彼らはそのゲーム - 囲碁 - をクリスマスプレゼントとして私にくれることにしました。本当に嬉しかったですし、盤も石も本当に綺麗でした。両親も一緒に遊んでくれましたが、付属のルールの説明が私たちにとって十分ではなかったため、正直言って私たち全員がルールを理解するのに苦労しました。そこで、何度か遊んでみた後、正しいルールと上手に碁を遊ぶ方法について探すことにしました。そして本屋でヴィンフリード・デーホルトという人が書いた「The Japanese game goo」というタイトルの囲碁に関する本を見つけて購入しました(ドイツ語の本)。それは 1981 年の春のことでした。当時の私にとって、この本は非常に適切な入門書でした。そして私

には経験豊富な囲碁好きが緊急に必要なことが明らかになりました。しかし、どうやって見つければいいのでしょうか？幸いなことに、この本の最後に、当時ドイツの囲碁協会の会長だったカール・エルンスト・ペーヒ氏に関する情報が載っていました。私はペーヒ氏に手紙を書き、私の故郷、ドイツのマインツに最も近い囲碁クラブについて尋ねました。しかし返事が来ませんでした。興味深い偶然ですが、その後私はペーヒ氏が熱心なエスペランチストであったことを知りました。彼は第二次世界大戦直後にエスペラント語を教え、ドイツ連邦共和国における「緑の」言語の先駆者であることに加えて、多くのエスペランチストを組織しました。しかし、私がエスペランチストになったのは、最初の囲碁の本でペーヒ氏の名前を見つけてから何十年も経ってからでした。

しかし、どうやら運命は、囲碁のサークルに私を近づけたかったようです。ある晩、私は父と一緒に、両親と住んでいた家のエレベーターに乗っていました。私たちと一緒に、ある若い男性がガールフレンドと一緒にエレベーターに乗り、彼女にこう言いました。「君が同意するなら、僕はこれから囲碁の会に行きたいんだ」と。彼らはエレベーターを降りました。私は自分の耳を信じられず、父にこう言いました。「お父さん、聞いた？」父はその男性をもてなした若い女性の家族の家に行き尋ねるよう勧めてくれました。そして、そうです、信じられないことに、この若い男性は物理学の学生で、当時ドイツでは非常に珍しい囲碁クラブの1つに頻繁に参加していました。もちろん彼は私の囲碁への関心に喜び、その日の夜に私をクラブに連れて行ってくれると申し出てくれました。それが私が囲碁に本格的に関わり始めたきっかけです。

それ以来、私は毎週ヴィースバーデンのクラブで囲碁を打ちました。そこで初めての大会に出場し、好成績を収めることができました。それは「マジスター・ルディ・トーナメント」に関するものでした（「マジスター・ルディ」とはラテン語で「ゲームの達人」を意味し、ドイツの作家ヘルマン・ヘッセの小説「ガラスの真珠のゲーム」の主人公にちなんで名付けられました）。クラブの打ち手のほとんどがマインツ出身であることが判明したため、幸運にも数か月後にクラブがマインツに移転し、私は夜の碁会に参加するのがはるかに楽になりました。

その後、囲碁に関する国際的な書籍や名人の棋譜にアクセスできるようになりました。またより強い人と打てるようになり、どんどん上達しました。両親が私に日本の有名な棋士の囲碁全集の英語版を買ってくれ、数年間その本全体を勉強しました。囲碁クラブの一人は、私の両親が住んでいた場所からそれほど遠くないマインツ大学で化学の博士号を取得しました。彼は論文のために長時間の実験をしなければならず、実験を開始してから結果が出るまでに長い待ち時間があったため、私を彼の研究室に招待し、そ

ここで私たちは中国風の碁石を並べた碁盤でよく囲碁を打ちました。余りきれいでない三角フラスコからコーヒーを飲みながらでした。

兵役中、私は時々、興味深い棋譜の研究と詰碁に夜を費やすことがありました。囲碁で面白い人たちと出会い、新しい友達ができました。私が兵役に就いた町には囲碁クラブはありませんでした。そこで私はアジアの言語を含むさまざまな言語で投稿を作成し、囲碁の強い人を探しました。そして、ドイツ語も英語も分からない中国人学生が現れました。私は中国語を話せなかったため、囲碁以外に共通言語はありませんでした。私たちは一緒に遊んだり、お茶を飲んだりして、共通言葉もなく友達になりました。

大学在学中、私はクラブで囲碁を打ち、国際トーナメントにも頻繁に参加しました。たとえば、数年間は毎年イースターの週末にパリで開催されたトーナメントで、中国や韓国からの囲碁愛好家の学生と友達になりました。今日に至るまで、私は住んでいきたいくつかの町での囲碁クラブで打ち続けました。

オンライン囲碁サーバーが利用可能になったことは大きな進歩でした。私が囲碁を始めたとき、他に十分な強い囲碁好きに会うのは困難でした。でもインターネットの登場後は、昼夜を問わず、打つ相手をすぐに見つけることができます。そのため、現在はさまざまな国際的な囲碁サーバーでも碁を打っています。

私が囲碁を始めた 80 年代当時、ドイツでの囲碁はかなり排他的でエリート的でエキゾチックな趣味でしたが、当時と比較するとドイツでの囲碁は今ではほぼ「大衆」現象です。ドイツの囲碁協会には 2000 人以上の会員がいます。今日のドイツの囲碁協会は非常によく組織されており、若い人たちを囲碁に関心を持たせることに気を配っており、新しいクラブに多大な援助を提供し、ナショナルチームのチャンピオンシップを企画しています。サッカー選手と同様に、選手たちを団結させることに優れた仕事をしており、かなり質の高い全国版囲碁雑誌を発行しています。

写真：ドイツのお城で囲碁を打つ人たち。

私が囲碁が本当に気に入ったのは、それが人類文化の頂点と精神の進化に関するものであり、その複雑さゆえに完全に探求することはできず、ほとんどミステリーのように敬意を払う必要があるということでした。私のそうした態度は、2016 年に囲碁を打つ AI、Alpha-goo が登場したことで多少揺らいだことは認めざるを得ません。囲碁愛好家なら誰でも知っているように、Alpha-goo は真の革命でした。今や、対局についてコメントしたり、さまざまな意見を議論したりするプロの棋士の評価は、それらの論争の背後にある抽象的な真実が何であるかを知ることは決して期待できないまま、もはや

